# 74-a IFEF-kongreso
## 6 - 12 majo 2023
## Antverpeno

### Dua informilo

- Ne forgesu **kunporti la konfirmilojn de la mendoj** kiujn vi faris.
- Anticipe informu nin se vi alvenos post la 23:00.

Baldaŭ okazos la 74-a IFEF-kongreso en Antverpeno. Antaŭ ol vi faros la valizon kaj forvojaĝos, ni volas doni al vi kelkajn praktikajn informojn por la alveno.

La alventago estas sabato, la 6-a de majo 2023. La kongresejo/tranoktejo estas Hostel Pulcinella kaj ties adreso estas: Bogaardplein 1, 2000 Antwerpen. La kongresa akceptejo funkcios ekde la 15:00. Se vi alvenos pli frue, vi povos lasi la pakaĵojn en la deponejo en la kelo.

Por la tranoktantoj: ne forgesu **kunporti mantukojn**. Vi povas lui mantukon surloke kontraŭ € 1,5. Littukoj ĉeestas.

Grava informo: se vi uzas publikan transporton, ĉie estas risko de ŝtelistoj, ĉefe en la bruselaj stacidomoj. Bone fermu viajn sakojn kaj estu tre atenta!

La vespermanĝo por tiuj kiuj mendis ĝin, okazos sabaton, la 6-an de majo, je la 18:30. Ĉiuj devas iri kiel grupo al la manĝejo akurate je tiu ĉi tempo. La vegetaranoj iru unue. Ili ricevos sian manĝon unue kun mencio de sia nomo.

1. **Alveno el la flughaveno de Bruselo-Zaventem**
   Iru al la kelo je la nivelo -1 kaj aĉetu trajnbileton. Vi povas âceti ĝin ĉe la giĉeto aŭ per blua biletmaŝino. **Petu normalan bileton** eĉ kiel +65-jarulo. La kaŭzo estas aldona pago por la tunelo Diabolo. Unudirekta bileto ĝis Antverpeno kostas € 13,30.
   Estas du rektaj trajnoj hore kun haltejoj en Mechelen kaj Antwerpen-Berchem: trajno je 11’ (finstacidomo Amsterdam CS) kaj trajno je 52’ (finstacidomo Antwerpen-Centraal). La vojaĝo daŭras malpli ol duona horo. La lasta trajno semajnfine estas je la 23:52.
   Vi povas eliri en Antwerpen-Berchem aŭ en Antwerpen-Centraal (vidu punktojn 7-8).
   Ankaŭ ekzistas buso de Zaventem al Antverpeno ĉiun duan horon. Ĝi nomiĝas ‘Airport Express’ kaj unu veturo kostas € 10. Ĝi veturas ĝis Rooseveltplaats en la centro de Antverpeno (www.airportexpress.be).
   Tria ebleco estas Flixbus de la flughaveno ĝis Antwerpen-Berchem (www.flixbus.com).

2. **Alveno el la flughaveno de Charleroi**
   Estas buso el la flughaveno ĝis Bruselo-suda stacidomo (*nederlande: Brussel-Zuid, france: Bruxelles-Midi*) de la kompanio Flibco.com. Bileto kostas € 16,60 kun busveturo ĉiun 20-an minuton.
   Ekzistas ankaŭ loka buso de la kompanio TEC de la flughaveno al la stacidomo de Charleroi-Central. Bileto kostas € 6. Poste vi aĉetu trajnbileton al Antverpeno (*nederlande: Antwerpen, france: Anvers*) kiu kostas € 16,80 (pli ol 65-jara € 7,80).
   Veturas unu rekta trajno hore de Charleroi al Antwerpen dum la semajnfino. Ĝi forveturas je 05’ kaj haltas en Antwerpen-Berchem kaj Antwerpen-Centraal. Vi povas eliri en ambaŭ stacidomoj (vidu la punktojn 7-8). La vojaĝo daŭras 1.51h.

3. **Alveno trajne el Bruselo**
   Estas tri ĉefstacidomoj en Bruselo: **Bruselo-Suda** (*nederlande: Brussel-Zuid, france: Bruxelles-Midi*), **Bruselo-Centra** (*nederlande: Brussel-Centraal, france: Bruxelles-Central*) kaj **Bruselo-Norda** (*nederlande: Brussel-Noord, france: Bruxelles-Nord*). La norda estas la plej taŭga por veturi al Antverpeno. Se vi estas en unu el la aliaj, ne gravas, vi aŭtomate venas al la norda stacidomo se vi veturas en la direkto de Antverpeno. Atentu ke rapid-trajnoj (ICE, Eurostar, Thalys) ne ĉiam haltas en la stacidomo Brussel-Noord nek en Antwerpen-Berchem. Unudirekta bileto al Antwerpen kostas € 8,40 (pli ol 65-jara € 7,80).

4. **Alveno per aŭto**
   Prefere uzu la navigilon por atingi la centron de Antverpeno. Estas multe da (subteraj kaj pagendaj) parkejoj en la proksimeco de la kongresejo sed lasi la aŭton tie dum la tuta kongreso estos multekoste. Surstrate vi povas parki maksimume dum 3 horoj, se vi entute trovos parklokon. Pli bone estas uzi parkejon je la rando de la urbo (Park & Ride) kaj poste uzi la publikan transporton. Atentu ke en Antverpeno ekologie malpuraj aŭtoj ne povas eniri la urban centron: bonvolu kontroli la kondiĉojn en la retejo https://visit.antwerpen.be/en/info/low-emission-zone.

5. **Taksioj** troviĝas sur la placo antaŭ la stacidomo Antwerpen-Centraal apud la konstruaĵo Elisabeth Center.

6. **La promendistanco** de Antwerpen-Centraal ĝis la kongresejo estas 2 km. Rigardu la mapon por la itinero.

7. **Tramo el Antwerpen-Berchem**
   Se vi jam eliras la trajnon en Antwerpen-Berchem, kies stacidomo situas antaŭ Antwerpen-Centraal se vi venas de Bruselo, vi forlasas la stacidomon de Antwerpen-Berchem kaj transiras la grandan placon kie troviĝas la blankkolora aŭtomato kaj la tramhaltejo por tramo 4. Vi elektas la direkton Hoboken kaj eliras je haltejo Sint-Andries. Poste vi transiros la Nationalestraat kaj eniru la Sint-Antoniusstraat. Vi alvenos tre baldaŭ sur la placo Bogaardplein kie situas la junulargastejo/kongresejo. Eblas ankaŭ uzi tramon 9 el Berchem (vidu la indikojn sub punkto 8).

8. **Tramo el Antwerpen-Centraal**
   Se vi eliras nur tie, vi devos malsupreniri ĝis nivelo -2 (du etaĝojn sub stratnivelo) kaj iri iom da distanco en koridoro ĝis la haltejo Diamant. En la koridoro estas blanka biletaŭtomato. Tiam vi devas denove malsupreniri (2 rulŝtuparoj !). Tie vi povas uzi tramon 9 (direkto P+R Linkeroever) aŭ tramon 15 (direkto Regatta). La tria halto estas Groenplaats (Verda placo!) kie vi eliras kaj serĉas rulŝtuparon supren kiu funkcias. Principe la irdirekto estas maldekstren al Nationalestraat.
   Trambiletoj aĉeteblas en la blanka 'ticketautomaat'. En la tramo vi devas skani vian bileton. Vi povas ankaŭ pagi en la tramo per kreditkarto aŭ sendi tekstmesaĝon (SMS) 'DL' al 4884. Eblas pagi al aŭtomato aŭ en la tramo mem per debetkarto (Maestro, Visa Debit). Simpla bileto kostas € 2,5 kaj validas unu horon. Karto por 10 veturoj kostas € 17, taga karto € 7,5 kaj tritaga karto € 15.

9. **Itinero de Groenplaats al la kongresejo**
   La distanco estas duona kilometro, promeno de 10 minutoj. Iru al Nationalestraat, poste maldekstren en Kammenstraat kaj fine dekstren en Sint-Antoniusstraat. La granda griza konstruaĵo je la maldekstra flanko estas la kongresejo, **Hostel Pulcinella**.

Ni deziras al vi bonan vojaĝon kaj senprobleman alvenon!

*Kristin Tytgat, LKK*
*Tel. +32 499 26 68 28*

# Provizora programo de la unuaj tagoj

## Sabato la 6a de majo

| | | |
|---|---|---|
| 15:00 - | *Nigra salono* | Alveno kaj akcepto |
| 16:00 - 18:00 | *Blanka salono* | Kunveno de VERDEN, nur por anoj |
| *18:30 - 20:00* | *Manĝejo* | *Vespermanĝo* |
| 20:30 - 22:00 | *Manĝejo* | Interkona vespero |

## Dimanĉo la 7a de majo

| | | |
|---|---|---|
| 08:00 - 10:30 | *Manĝejo* | *Matenmanĝo* |
| 09:30 - 12:00 | *Inaŭgura salono* | Solena inaŭguro - komuna foto |
| 12:00 - 13:00 | *Inaŭgura salono* | Akcepto / regalado |
| *12:30 - 14:00* | *Manĝejo* | *Tagmanĝo* |
| 14:30 - 17:30 | | D1 - promeno - vizito de la urbo |
| 14:30 - 17:30 | | D2 - promeno - vizito de la Centra Stacidomo kaj ĉirkaŭaĵo |
| 15:00 - 18:30 | *Gufujo* | La libroservo de Flandra Esperanto-Ligo |
| *18:30 - 20:00* | *Manĝejo* | *Vespermanĝo* |
| 20:00 - 21:45 | *Manĝejo* | Flandra Vespero - informoj kaj muziko el Flandrio |

## Lundo la 8a de majo

| | | |
|---|---|---|
| *07:30 - 09:30* | *Manĝejo* | *Matenmanĝo* |
| 09:00 - 10:15 | *Blanka salono* | Konversaciiga Esperantokurso |
| 09:00 - 10:15 | *Nigra salono* | Plenkunsido IFEF, publika - 1a parto |
| *10:15 - 10:45* | *Koridoro* | *Kafpaŭzo* |
| 10:45 - 12:00 | *Blanka salono* | Konversaciiga Esperantokurso |
| 10:45 - 11:30 | *Nigra salono* | Plenkunsido IFEF, publika - 2a parto |
| 11h30 - 12:00 | *Nigra salono* | La venonta kongreso sin prezentas |
| *12:30 - 14:00* | *Manĝejo* | *Tagmanĝo* |
| 14:00 - 15:15 | *Nigra salono* | Laborkunsido de la faka komisiono |
| 15:15 - 16:30 | *Nigra salono* | Fakaj prelegoj, 1a parto |
| 15:15 - 18:30 | *Gufujo* | La libroservo de Flandra Esperanto-Ligo |
| *16:30 - 17:00* | | *Paŭzo (trinkejo estas malfermita)* |
| 17:00 - 18:00 | *Nigra salono* | Ateliero: Velo-Relo - 1a parto |
| *18:30 - 20:00* | *Manĝejo* | *Vespermanĝo* |
| 20:00 - 21:45 | *Manĝejo* | Kultura Vespero |


## Mardo la 9a de majo

| | | |
|---|---|---|
| *07:30 - 09:30* | *Manĝejo* | *Matenmanĝo* |
| 09:00 - 10:30 | *Blanka salono* | Konversaciiga Esperantokurso |
| 09:00 - 09:45 | *Nigra salono* | Ĉefprelego 1: Stacidomoj en Belgio/Antverpeno: arkitekturo kaj kultura fono |
| 09:45 - 10:30 | *Nigra salono* | Ĉefprelego 2: Historio de la unua pasaĝera fervojo sur la eŭropa kontinento |
| *10:30 - 10:50* | *Koridoro* | *Kafpaŭzo* |
| 10:50 - 12:00 | *Blanka salono* | Konversaciiga Esperantokurso |
| 10:50 - 12:00 | *Nigra salono* | Fakaj prelegoj, 2a parto |
| *12:00 - 14:00* | *Manĝejo* | *Tagmanĝo* |
| 12:45 - 18:00 | | F1 - ekskurso al Trainworld (Schaarbeek - Bruselo) |
| 15:00 - 18:30 | *Gufujo* | La libroservo de Flandra Esperanto-Ligo |
| *18:30 - 20:00* | *Manĝejo* | *Vespermanĝo* |
| 20:00 - 21:45 | *Manĝejo* | Koncerto Georgo Handzlik kaj Saša Pilipović |


# Flandrio




# Groenplaats kaj kongresejo



# Inaŭgura salono kaj kongresejo




## Ĝis baldaŭ!